

20-a Konferenco Alpoj-Adrio-Danubo (Bjelovar 2018)

Intenco de tiu chi mallonga kontribuo estas akcenti la pasintajn atingojn, nunajn cirkonstancojn kaj estontajn eblecojn. Tuj ni devas diri ke antau la nuna jubilea 20-a konferenco okazis almenau 18 trilandaj AA konferencoj (Austrio, Italio, Jugoslavio, poste ankaŭ Hungario). Dokumentoj kaj fotoj de tiuj konferencoj trovighas en la Austra nacia muzeo- esperanto parto- en Vieno.

Nunaj konferencoj pro la internaciaj politikaj shanghoj prave pli akcentas regionan kunlaboron en tiu chi parto de Europo, kaj tial ankaŭ konsideras pli vastan Alp-Adria-Danuban teritorion. Chiuokaze tio entenas almenau kvin diversajn shtatojn, popolojn kaj lingvojn kun longa tradicio kaj tikla historio.

Tial niaj landaj E asocioj provu analizi nunan aktivecon de oficiala AA Komunumo (rigardu <http://www:alps-adriatic-aliance.org>) kaj kunlaboron de publikaj rimedoj (radioj, televidoj, gazetoj) en la regionoj A-A-D. Ni devas eluzi ekzistantan de ni pagitan profesian strukturon! Aldone ni elektu plej amasajn publikajn internaciajn aranghojn kaj prezentu nian E movadon tie. Ekzemple ni (esperantistoj el Austrio, Italio kaj Slovenio) tion faras chiujure dum la internacia renkonto de la montaranoj sur la trilanda limpunkto, kien venas kelkmilo da homoj. Tiel ni per nia internacia cheesto kaj praktika prezento de egalrajta komunikado plej efike atentigos kaj informos eksteran publikon pri la rolo de esperanto. Do, ni trovu novajn vojojn por kunlaboro en la vasta regiono A-A-D. Janez Zadavec

Dua parto- daurigo: ni konsideru ke AA alianco havas plejparte samajn celojn kiel nia E movado; ke estas formala formo kun organiza, enhava kaj persona strukturo (ekz. en KR personoj taskigitaj por konkreta enhavo en Čakovec, Karlovac, Koprivnica, Krapina, Varaždin); ke eblas aligita (senpaga) membreco; Propono:

1. Niaj landaj organizoj rekte kontaktu kunordigan reprezentanton de AA alianco en sia lando informante pri la 20-a AAD Konferenco kaj pri nia E aktiveco
2. Ni petu ilian subtenon por nia membreco (aligita membro) en la AA alianco. Nia reprezentanto estas nia AA Asembleo (kie niaj landaj organizoj havas reprezentanton)
3. Ni petu eblecon por ricevi memstaran retpaghon en la AA alianco (kiel ekz. havas filatelistoj). Tiun paghon ni prizorgos enhance kaj redakte
4. Ni anoncu nian 21-an AAD Konferencon, por kiu ni petos subvencion kaj proponu, ke la konferecu eniru Programon de la aranghoj de AA alianco
5. Ni sekvu plej grandajn aranghojn de AA alianco en nia proksimeco kaj partoprenu ilin prezentante E movadon

Atentigo: diskuto pri tiu propono postulas konon de AA alianco (trovebla en la retpagho)